

Majo 2016

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2016:2



La kongresanoj aŭskultas la prelegon pri Szymborska. (foto de Andreo Bach)



Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2016 • 104-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

svenska@esperantoforbundet.se

E-post till redaktionen: laespero@esperantoforbundet.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

Tryck: Pingvinpress, Råå

Prenumeration: 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Besöksadress: Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

Postadress: Box 2276, 103 17 Stockholm

E-post: svenska@esperantoforbundet.se

Nätsida: www.esperantoforbundet.se

Öppettider: Esperanto-Centro har begränsade öppettider. Ring i förväg!

Plusgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

IBAN-konto: SE50 9500 0099 6034 0002 0123

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Box 2276, 103 17 Stockholm

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.algonet.se/~eldona

E-post: eldona@esperantosverige.se

Telefon: 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

Nätsida: www.esperantogarden.se

E-post: info@esperantogarden.se

Telefon: 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperantoforbundet.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan. sv

Nia kongreso en Gdansko fariĝis granda sukceso. Ni ĝuis la gastamon de niaj polaj samideanoj, klubanoj de Triurba Esperantista Asocio Torento, kiuj atendis nin en la flug- kaj ŝiphavenoj kaj gvidis nin tra abunda programo de ekskursoj kaj kulturaj aranĝoj. Krome ni ĝuegis la belegan veteron kun sunbrilo de sennuba ĉielo.

Sabato estis nia oficiala jarkunvena tago. Komence la estraro respondis kelkajn demandojn de la ĉeestantaj membroj, inter alie pri la uzado de la retpaĝaro. La jarkunveno de SEF, gvidata de Martin Strid, iris glate. Estis decidite ke la estraro konsistos el 5 personoj kaj ke Olof Pettersson estos nova prezidanto por unu jaro. La ceteraj estraranoj estas Ann-Louise, Puff, Anita kaj Stella. Du anstataŭantoj estis elektitaj: Ulrika Hoppe por du jaroj kaj Yuejin Guo por unu jaro. La revizoroj, kiuj estis nov-elektitaj pasintjare, estis reelektitaj. La elektoprepara komisiono por la venonta jarkunveno konsistos el Tatu Lehtilä kaj Martin Strid.

La estraraj proponoj pri buĝeto, membrokotizoj, honora membreco al Ebbe Vilborg kaj, post iom da diskutoj, 12-monata membroperiodo kaj sekva ŝanĝo de § 5 en nia statuto, estis akceptitaj. La laste menciita propono revenos dum la sekvonta jarkunveno, ĉar statutŝanĝoj ja devas esti akceptitaj dufoje.

Fine la estraro raportis ke ni laboras pri okazado de nia venontajara kongreso en malnova uzina vilaĝo Forsvik en Vestrogotio kaj ke ni ricevis proponon pri komuna kongreso kun Dana Esperanto-Asocio en 2018. Bengt Nordlöf kunportis salutvortojn kaj informojn de Esperanto-Gården kaj Sten Svenonius laŭ instigo de Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato en Poznano, informis pri la instruista trejnado kiu okazas lige kun la tri-jara interlingvistika programo.

La nova estraro por 2016:

Prezidanto:	Olof Pettersson
Vicprezidanto:	Ann-Louise Åkerlund
Sekretario:	Puff Östling
Kasisto:	Anita Dagmarsdotter
Respondeculo	
pri retpaĝaro:	Stella Lindblom
Anstataŭantoj:	Yuejin Guo kaj Ulrika Hoppe

La estraro respondas: Puff Östling, Olof Pettersson, Ann-Louise Åkerlund, Anita Dagmarsdotter, Dan Palm. (nekonata fotanto)



Jarkongreso de SEF 2016 okazis en Gdansk

La kongreso estis plena de kultura programo en tre vasta signifo. LKK prezidanto Sten Svenonius, Elwira, Jagoda, Andreo, anoj de LKK, energie kaj sukcese kunlaboris por konigi al ni sian Triurbon apud la Balta maro.

Ni ĉiuj scias, ke sukcesa kongreso postulas grandegan laboron kaj ke la organiza komitato forgesu nek la superrigardon nek la detalojn. La nunjara komitato tre bone pripensis ĉion. Ili ankaŭ montris kiel bone esperanto funkcias kiel laborlingvo inter diverslingvaj landoj. Tio ja estas la animo de esperanto, kaj tion ni diras al la mondo.

Partoprenis la kongreson 60-o de geesperantistoj el 6 landoj, duono de ili el Svedio. Nia kongresejo, Hotel Szydłowski, estis ĉarme malnovstila kaj

komforta. Ĝi situis oportune proksime al la flughaveno kaj havis bonan konekton kun la celoj de niaj diversaj ekskursoj.

En la hotelo estis metita granda bela afiŝo pri nia kongreso. Ĝi estis farita de facebook.com/TORENTOSOPOT kaj montris la "gruon", la simbolon de Gdansk. Kun sama motivo ĉiu kongresano portis nomŝildon kun granda, bone legebla nomo.

Kiel partoprenanto mi konstatis, ke ĉiu informo estis klara kaj ĝustatempa. Por niaj diversaj ekskursoj la ekgvidado komenciĝis ĉe la hotelo. La polaj gvidantoj estis tie akurate por gvidi la grupojn. Ĉio antaŭpripense!

Mia grupo en Malnova urbo ricevis informojn pri historio de diversaj periodoj, pri arkitekturo

kaj pri diversspeca kunlaboro ĉirkaŭ la Balta maro.

Tuta komenco de majo estis plena de festotagoj, la 3-an de majo estis Nacia tago, honoriganta la konstitucion, la 5-an, Ĉielira tago de Kristo, (tre ŝatata episkopo estis entombigita samtage) la 9-an, Tago de Paco post la Dua Mondmilito.

Multaj junularaj grupoj ĝoje moviĝis tra la urbo arbaren. La urboj pompis je Festo tutan tempon. Ankaŭ ni promenis tra la diversaj tri urboj. Gdynia montris sin feste sub varma suno dum ni promenis laŭ la haveno kun la impona velŝipo plej granda en la mondo, kiu iam estis lerneja ŝipo por maristo-lernantoj. Ni uzis la novan "lifton" al la pinto de la multe preparolata "Ŝtona Monto", de kie ni havis belan rigardon super Gdynia kun haveno kaj



Vidita en la Interkona vespero.
(Fotis Saliko)



Tomasz Chmielik prezentas Wislawa Szymborska
(Fotis Saliko)



Elwira Twardowska kaj Kerstin Rohdin
deklaman Szymborska pole kaj svede. (Saliko)

parko ĉemara kun impona memorilo pri Joseph Conrad, la polo, kiu verkis pri sia vivo surmara anglalingve, la lando en kiu li loĝis.

Ni per "piratŝipo" veturis al Westerplatte, kie komenciĝis la Dua Mondmilito. La suno bonvenigis nin al la plej longa moleo de Eŭropo, alkonstruita plurfoje. Ni promenis sur ĝi ĝuante la vastan akvosurfacon kaj rande vidante la silueton de

duoninsulo Hel, fama botanika trezorejo kaj aliflanke la levgruojn de la fama ŝipkonstruejo en Gdansk. En Solidareco-centro ekspozicio detale rakontis pri la eventoj de la 1980-jaroj en Pollando, eventoj kiuj aliigis Eŭropon. Andreo Bach eminente interpretis la polan gvidiston.

Dumvespere ni aŭdis prelegon pri la nobelpremiito Wislawa Szymborska de profesoro Tomasz Chmielik. Li malkovris

al ni multajn malfacilaĵojn pri la tradukarto kaj iom plonĝigis nin en la esperantan literaturon i.a. en la nove eldonitan "Historio de la esperanta literaturo" de Minnaja kaj Silfer.

Du studentoj pri sveda lingvo ĉe la universitato de Gdansk legis al ni du poemojn de Szymborska en bone prononcita sveda lingvo. En Arta Centro Kim kune kun sia filo prezentis sian muzikon. Oni invitis gran-

dan grupon de skoltoj por per tiu junuleca muziko informi ilin pri esperanto.

Ni spektis tre interesan filmon pri Johano Hevelius, tre fama astronomo en la 17-a jarcento, kiu kiel la unua homo desegnis mapon pri la surfaco de la luno. Li multe laboris, sed multaj okazintaĵoj en lia vivo estis por li malbonŝancaj. La filmo havis subtekstojn en esperanto. Ĝi estis profesie produktita kaj gajnis premion inter internaciaj dokumentaj filmoj.

Apud la "Kurba Domo", vidindaĵo de Sopot, ni ĝuis la adiaŭan lunĉon kun pola tradicia manĝo. Surtable kuŝis bela esperanta menuo kun priskribo pri la diversaj polaj manĝaĵoj. Poste ni kafumis en la klubejo de TORENTO, antaŭ ol ni promenis al la fama jubilea kverko, kiu unue estis plantita dum UK 1927. Diverslandaj tiamaj kongresanoj kunportis teron de siaj hejmlandoj por

planti la kverkon. Dum la 30-aj jaroj hitlerana batalgrupo forhakis ĉion. 1959 dum TEJO-renkontiĝo oni replantis novan kverkon, kiu nun tie kreskas kaj estas dum multaj jaroj prizorgata de Harry Spirowski.

Andreo kaj Kim fermis la renkontiĝon per kantoj. Kim kantis sian kanton "Sola" pri sento postkongresa. La kongresanoj revenis hejmen fluge aŭ boate tre kontentaj post multaj interesaj travivaĵoj kune kun novaj geamikoj en Esperantio. Ili memoros bone organizitan kongreson multenhavan.



Kerstin Rohdin

Belegaj tagoj en Gdansko

Kiel mi antaŭvidis, niaj karaj Elwira kaj Jagoda, kiuj vizitis nin dum nia Upsala kongreso pasintjare, faris bonegan laboron kune kun siaj geamikoj en la Triurba Esperantista Asocio Toronto kaj ĝia prezidanto Andreo Bach, kiu eminente interpretis dum la gvidado en la muzeo kaj plurfoje dum diversaj programeroj kantigis nin.

De la sveda flanko Sten Svenonius, kiu iniciatis la kunlaboron, bone prizorgis niajn aliĝojn kaj la ekonomiajn transakciojn. Ni povis ĝui riĉan programon kaj belegan veteron.

La Interkona Vespero jaŭde okazis en kulturdomo en la urboparto Zaspas. Ni tostis, manĝis bongustaĵojn en bele aranĝita bufeda tablo, kantis, spektis filmon kaj ĉendancis kun Martin Strid. Pluraj poloj kaj kelkaj alilandanoj partoprenis, ankaŭ dum la venontaj tagoj.

Vendrede ni promenis tra la centra urbo de Gdansko, kun bele riparitaj kaj restaŭritaj domoj, kaj vojaĝis per "pirata ŝipo" tra la haveno al Westerplatte, kie okazis la unuaj eksplodoj de la Dua Mondmilito. Poste ni vizitis la Eŭropan Domon de Solidareco kun eminenta gvidado tra la muzeo pri la okazaĵoj en la 1980-aj jaroj, kiuj verŝajne estis la komenco de la faloj de la komunistaj reĝimoj en Pollando kaj aliaj landoj.

Vespere Tomasz Chmielik, en la biblioteko de la urboparto Wrzeszcz, prelegis pri la nobelpremiita poetino Wisława Szymborska kaj pri sia libro kun

traduko de kolekto de ŝiaj poemoj en esperanton. Belaj surprizoj por ni estis ke du gejunuloj, polaj gestudentoj de la sveda, legis kelkajn poemojn en la sveda kaj ke Kerstin Rohdin kunportis amuzan poemon kiun ŝi legis en la sveda alterne kun Elwira en la pola. Kaj svedoj kaj poloj ridis.

Sabato estis nia jarkunvena tago, pri kiu vi povas legi aliloke. Vespere okazis koncerto kun Kimo Henriksen kaj lia filo Villads en junula kulturdomo en la urboparto Oliwa. "Ĉiuj" konas Kimon sed eble ne lian filon, kiu estas vera talento pri kaj muziko, dancado kaj ĵonglado. Ilian koncerton aprecis kaj ni "maljunuloj" kaj la gejunuloj de la kulturdomo.

Dimanĉon, tre varma tago, ni pasigis en Sopot promenante sur la fama Moleo (kajponto), trinkante kafon en la klubejo kaj renkontiĝe ĉe la jubilea kverko en la Arbarherbejo de Esperantistoj. Tie ni tostis, multe kantis kaj eĉ ĉendancis. Estis kortuŝa adiaŭa programero fine de la plej sukcesa sveda esperanto-kongreso dum jaroj.

Kimo, Villads kaj Andreo muzikas ĉe la memortabulo



Ann-Louise
(Teksto kaj fotoj)

Ĉendanco ĉe la kverko



En la klubejo en Sopot



Rondo Langlet

Grandaj laboroj en Esperanto-Gastigejo

Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors estas kooperativo, kiu celas servi al Esperanto kaj internacia komunikado ofertante servojn, krom al esperantistoj, ankaŭ al ordinaraĵaj turistoj kaj aliaj eventoorganizantoj. La granda entuziasmo de antaŭ 20 jaroj, kiam la kooperativo ekagadis en la eksa maljunulara hejmo en Vermlando, iom post iom perdis sian ardon. Pluraj centraj aktivuloj de la komenca tempo jam forpasis, kaj ni ne sukcesis varbi novan generacion kun sama dediĉo kaj tempodispono. Lennart Svensson kaj Bengt Nordlöf, kiuj aktivis dekomence, daŭre faras grandan kontribuon, kaj estas iuj sindediĉaj subtenantoj. Tamen ne estas alloga tasko alpreni respondecon pri granda domo kun altaj kostoj kaj nesufiĉa monenfluo konsiderante la riparbezonojn kaj la limigojn de plene volontula prizorgo.

Kiel prezidanto de la kooperativo mi komprenis kiel mian ĉefan taskon vidi vojojn al plutenado de la domo kaj ties financa kaj organiza stabiliĝo. Ni havis kontaktojn kun eblaj transprenontoj de la ĉiutaga prizorgo, sed la financa situacio estis malalloga faktoro. Por solvi tiun problemon, kaj samtempe fari ion konkretan je granda bezono, ni decidis oferti niajn servojn al la Migrula aŭtoritato por loĝigo de azilpetantoj. Ni povas oferti lokon por pli ol 50 homoj, tamen konservante iom da spaco por Esperanto-rilataj bezonoj ankaŭ dum la periodo dum kiu nia ĉefa kapacito dediĉiĝos por tiu celo. Krom la atendataj enspezoj gravas la spertoj pri profesia agado, kiujn ni ricevas. Tiel ni taksas ke ni atingos la necesan stabilan bazon por daŭre, kaj fortigite,

kontribui al Esperanto. Tamen, dum iom da tempo, ni devos dediĉi nin ĉefe al provizo de servoj por la ŝtato, ĝis ni denove plene disponigos la domon por Esperanto-eventoj kaj aliaj gastoj.

La ordigo de la aferoj montriĝis eĉ pli malfacila ol ni imagis. La unuajn kontaktojn kun la aŭtoritato ni havis kun helpo de pera firmao, sed sukcesis en aprilo sendi rektan mendon. Krome la tegmento kaj amaso da aliaj grandaj kaj malgrandaj aferoj bezonis urĝan atenton. Montriĝis iuj mankoj en nia fajrosekureco. Ni, feliĉe, danke al pruntoj kaj donacoj, sukcesis realigi la plej gravajn renovigojn kaj ordigojn.

Estis instalitaj necesejoj kaj aliaj ekipaĵoj, ekz. lavmaŝinoj, fajroalarmiloj, sekuraj kaj malpli energikonsumaj lampoj. La tegmenton de la suda parto de la domo ni renovigis. Sep ĉambroj ricevis novajn fenestrojn. Tuta etaĝo estas novfarbita. Signifaj elektraj riparoj estas plenumitaj. Krome ni ŝanĝis la plankon en la manĝejo al pli fortika kaj facile purigebla. Jen nur kelkaj ekzemploj de grandega laboro, parte volontula kaj parte pagita. Ni estas je skribo de tiu ĉi teksto en majo preskaŭ pretaj pri plenumo de la kondiĉoj kaj esperas iom post iom repaĝi la pruntojn, kiuj ebligis al ni savi la domon.

Mi persone volas speciale danki pro la donacoj al Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors honore al mia patrino, Carola Antskog, kiu mortis fine de 2015, al Synnöve Mynttinen, Anneli Hansen, Esperantoklubo de Salo, Lennart Svensson, Douglas Draper, Tiina Oittinen kaj Anja Karkiainen. Pluraj aliaj faris gravajn kontribuojn, home, mone kaj konsile.

Donacoj kaj pruntoj estas daŭre bonvenaj je PG-konto 4440245-1 Esperanto-Gården i Lesjöfors (IBAN: SE26 9500 0099 6042 4440 2451 BIC (SWIFT): NDEASESS), UEA-konto lesj-q. Pliaj informoj de <info@esperantogarden.se> aŭ <prezidanto@esperantogarden.se> Eblas ankaŭ aĉeti onojn* (andelar) de la kooperativo po 100 kronoj.

Renoveringar och förberedelser på Esperanto-Gården
Esperanto-Gårdens styrelse har satsat stort på renoveringar och iordningsställande av rum under de senaste månaderna. Avsikten är att erbjuda största delen av vår kapacitet som boende för asylsökande. Kooperativet kommer att anställa personal och även anlita andra firmor exempelvis för städning och ekonomiadministration. Renoveringarna har varit möjliga tack vare donationer och lån.

Lennart Svensson, vice ordförande i kooperativet och Esperanto-Gårdens allt-i-allo sedan starten för 20 år sedan ger några exempel på hur stor betydelse de frivilliga insatserna kan ha:

”Ibland kommer någon för att arbeta någon dag eller någon vecka ideellt på Esperanto-Gården. En av de flitigaste är en av andelsägarna, Tatiana [Tatjana] Rodakova från Moskva som dyker upp lite då och då. Ibland är maken Vladimir Malinak med, men då måste de lämna sin huskatt till ett katthotell i Moskva. Efter att hon fick veta att vi ska öppna upp asylboende har hon flera gånger frågat per mejl hur det går.

När jag informerade henne om hur mycket arbete som måste göras i början av mars sa Tatiana. ”Esperanto-Gården måste komma igång med boendet för att kunna utveckla och förbättra gården för framtida esperantoaktiviteter. Sedan kan de nya gästerna få lära sig esperanto.” Helt plötsligt dyker Tatiana och Vladimir upp i slutet av april och återvänder hem den 14 maj.

Under påskhelgen kom Karin Rylander med sin son Anders samt barnbarnet Gottfrid, 4 år, på några dagars besök. Karin konstaterade att det fanns mycket att göra och återvände tillsammans med Gottfrid som ville åka tillbaka till Esperanto-Gården för att umgås med Lennarts hund Saĝa. Tillsammans hann de utföra mycket arbete inne på gården men även ute i trädgården då sommarvärmen slog till.”

Anna Ritamäki-Sjöstrand,
prezidanto

Dum la renovigo de nia kromdomo/ Under renoveringen av annexet: Bengt Nordlöf, Lennart Svensson, Tomas Jansson, Douglas Draper.



LittFest en Umeå

LittFest estas granda literatura festivalo en la nord-sveda urbo Umeå. Ĝi okazas ĉiun jaron dum semajnfino en marto, kaj en 2016 ĝi festis sian 10-jaran jubileon.

SEF, kunlabore kun Eldona Societo Esperanto kaj la esperantoklubo en Umeå, jam la duan fojon partoprenis kun informtablo kaj disdonado de slipetoj "bokmärken", kiuj ja estas taŭgaj donacetoj en tia medio.

Kiam ni ofertis la slipetojn ni klopodis alparoli la preterpasantojn kaj diversmaniere informi pri esperanto. Gravus la reagoj de la alparolatoj por decidi kiajn aspektojn de la lingvo, movado aŭ/kaj literaturo oni prilumu. Iom surprizis min ke granda plimulto de la homoj, kun kiuj mi parolis, jam aŭdis pri esperanto kaj aŭ mem iom studis ĝin aŭ konas iun kiu uzis ĝin (patro, onklo, avino ...). Sed eble ne estas tiom surprize, konsiderante la mezuman aĝon de la partoprenantoj de literatura festivalo ...

Ann-Louise



Årets upplaga av Språkrådsdagen, som arrangeras av Institutet för språk och folkminnen, hade temat "språk som möts". Föreläsningarna under dagen handlade om intellektuella fördelar med att vara flerspråkig genom att man har dubbelt ordförråd, om översättning och svårigheter att överföra begrepp från främmande kulturer, om flerspråkiga elevers tillgång till utbildning och språk i skolan, och om intensivutbildning i svenska utomlands för specialtläkare i Polen respektive telefonister för färdtjänstbokning i Moldavien.

Mikael Parkvall avrundade med att berätta om olika pidgin- och kreolspråk.

Minoritetsspråkspiset 2016 gick till Susanne Sznajderman-Rytz för hennes arbete med att revitalisera och synliggöra minoritetsspråket jiddisch.

Årets klarspråkskristall tilldelades Sundsvalls kommun för deras tydliga och genomarbetade e-tjänst för skolskjuts. Bägge priserna delades ut av kultur- och demokratiminister Alice Bah Kuhnke.

Olof Pettersson


Esperantistoj vivas longe ...

Jam 96-jara estas Ulla Nordh, kiu fariĝis membro de Klubo Esperantista de Helsingborgo en 1954. Dum pluraj periodoj ĝis fine de la 1990-aj jaroj ŝi havis diversajn postenojn en la estraro kaj multe aktivis en la klubo. Ŝi faris prelegojn, kunaranĝis nombro da ekspozicioj kaj vizitojn de eksterlandaj esperantistoj, inter alie de la Internacia Altlernejo en Elsinoro, kio estis plurjara tradicio. Kun Marjorie Boulton, kiu du-tri fojojn venis prelegi en nia klubo, ŝi fariĝis bona amikino.

Ulla malkovris esperanton dank' al sia amikino Inga Magnusson (antaŭe Osterman), kiu siavice havis sian unuan kontakton kun la Internacia Lingvo kiam ŝi kiel malgranda knabino aŭskultis rakontojn de fabeloj dum aranĝoj de la laborista movado. Ili kune multe vojaĝis kaj vizitis klubojn kaj unuopajn esperantistojn en pluraj landoj. Ulla kun granda ĝojo memoras sian longan esperantistan vivon.

Aliaj esperantistoj kiuj antaŭ nelonge festis siajn datrevenojn estas Ebbe Vilborg je la aĝo de 90 kaj Arne Lundkvist kun siaj 97 jaroj.

Ann-Louise



Nek somera kurso, nek KEF en 2016

La somera kurso de Esperanto en Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors ne povos okazi en 2016. Ankaŭ la anoncita Kultura Esperanto-Festivalo ne povos okazi en Lesjöfors en 2016.

Por interesiĝantoj pri, speciale muzika, kulturo ni rekomendas la Elfridan feston ekde la 26a de junio 2016 en tradiciaj paŝtejbudoj de Folia Monto (Lövberget) en Dala-Fluda paroko, Svedujo kaj la volontuladon por esperantistoj en la Roskilda festivalo en Danlando, kiu komenciĝos la 25an de junio (la volontulaj laboroj, kiu ebligas la senpagan partoprenon, ekde la 28a).

Unuopaj gastoj kaj malgrandaj laborkunvenoj de tempo al tempo povos esti gastigataj en Esperanto-Gastigejo dum la sekva jaro. Bonvolu kontakti nin por ke ni trovu bonan solvon. Ankaŭ volontuloj estas bonvenaj laŭ interkonsento.

Ingen sommarkurs eller festival 2016

Det blir ingen sommarkurs på Esperanto-Gården i Lesjöfors sommaren 2016, inte heller kulturfestival, vilket vi tidigare hade planer på. I texten på esperanto ger vi tips om två andra kulturevenemang i Norden där man har nytta och glädje av sina esperantokunskaper i sommar.

Anna Ritamäki-Sjöstrand,
ordförande

Ĵus aperis: Esperantokurso per rekta metodo kiel apo por Android

Internacia Esperanto-Instituto en Hago hieraŭ lanĉis – post stadio de testado kaj korektado – novan aplikaĵon por lerni Esperanton. En la butikoj de Googleplay vi trovas ĝin.

Jen kion raportas pri ĝi la retpaĝo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago, <http://www.iei.nl/ieieo77.htm>

Tre konata estas la Esperanto-kurso Esperanto per rekta metodo de Stano Marĉek. Kvankam la kurso mem nur estas en Esperanto, ĝi por diversaj naciaj komunumoj aperis kiel libro kaj kiel kompakta disko kun nacilingvaj klarigoj. Nun ĝi ankaŭ aperis kiel t.n. "apo". (Volumo 1, lecionoj 1 ĝis 11).

Apo (mallongigo de aplikaĵo) estas komputilprogramo por t.n. plurfunkciaj poŝtelefonoj [angle: smartphones]. Tia poŝtelefono ne nur estas telefono, sed vera komputilo: per ĝi oni povas telefoni, fari fotojn, trovi la vojon, interreti, tviteri, pririgardi filmojn, aŭskulti muzikon, ktp., ktp.

Multaj homoj jam havas ĝin. Oni amase vidas ilin surstrate, en trajnoj, en butikoj, en publikaj konstruaĵoj.

Patr(in)oj malantaŭ infanĉaroj, gejunuloj sur biciklo, oficistoj en kontoroj, laboristoj en konstruejoj,...

Kelkfoje ŝajnas kvazaŭ homoj nur komunikas per sia poŝtelefono...

Ekzistas almenaŭ tri specoj de apoj:
- apoj kiuj (nur) funkcias en telefonoj de Apple (markoj i.a. iPhone),
- apoj kiuj (nur) funkcias en Android telefonoj (markoj i.a. Samsung),
- apoj kiuj (nur) funkcias en Windows telefonoj (i.a. Nokia).

Oni nur povas elŝuti (akiri) kaj instali apojn per la butikoj de tiuj firmaoj: Android-apoj nur per la apobutiko de Google.

Estas konata la apo Duolingo: por multaj lingvoj ĝi havas lingvan lernilon, nun ankaŭ en Esperanto.

Estas ĝoje ke nun ankaŭ aperis Esperantokurso kiel apo por Android.

Ĝi estas vera kurso, nome surbaze de la materialo de Esperanto per rekta metodo.

Piet Buijnsters, la programisto, uzis por ĝi la tre trafajn kaj instruajn bildojn (desegnaĵojn) de Linda Marĉekova el la kursolibro kaj kiam oni klakas aŭ tuŝas la tekstojn de la kurso oni ankaŭ tuj povas aŭdi la klaran prononcadon.

En ĝi ankaŭ estas la ekzercoj kaj taskoj de la libro.

La apo rigore sekvas la taŭgan, meto-dan instrulinion de la kurso, sed kompreneble oni povas mem elekti sinsekvon kaj rapidon, ĉar granda profito de la kurso kiel apo estas ke tiuj kiuj havas plurfunkcian poŝtelefonon laŭ ŝato kaj en diversaj cirkonstancoj povas uzi ĝin kaj lerni Esperanton: kiam oni veturas en trajno, kiam oni devas ie atendi, preskaŭ ĉie ajn kaj ĉiam ajn...

La apo ankoraŭ estas senpaga. Por elŝuti kaj instali ĝin: iru per via poŝtelefono al la Google-apo-butiko (Google Play) kaj trovu ĝin per la serĉvorto Esperanto aŭ Esperantokurso. Certe rakontu al ne-Esperantistoj!

Amike salutas, kaj dankas pro disvastigo de la informo

Stano Marĉek

Estimataj,

Mi ŝatus informi vin, ke la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko nuntempe skanas grandan parton de la publikaĵoj pri la unuaj 31 Universalaj Kongresoj de Esperanto. La publikaĵoj pri la unuaj 15 Universalaj Kongresoj jam estas legeblaj en la interreto, dum la venontaj semajnoj ni iom post iom enretigos pluajn skanaĵojn.

Universalaj Kongresoj 1905-39
<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/23525.htm>

Skinitaj libroj
<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm>

Skinitaj periodaĵoj
<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm>

Korajn salutojn,
Bernhard Tuidler

Estimataj legantoj

La celo de tiu retmesaĝo estas atentigi vin pri la internacia Scienca Asocio esperanta (ISAE). ISAE estas fakasocio pri sciencoj aliĝinta al UEA kaj fondita en 1906. Ĝi eldonas la revuon "Scienca revuo" mallongigita SR-on ekde 1949. Lastseptembre jam aperis artikolo en la revuo Esperanto pri la baldaŭa renovigo de la asocia retpaĝo. Dua artikolo aperos en la venonta numero de la sama revuo.

ISAE kaj sia revuo estas unu el la tre malmultaj asocioj pri sciencoj. La aliĝo estas tute senpaga! eĉ se eblas fari donacon laŭplaĉe. Vizitu la retpaĝon: <https://aktuale.sciencia-revuo.info/>

Kompreneble, ni invitas la landajn asociojn al informo de iliaj membroj pri ISAE.

Se eblas aperigi artikolon pri ISAE en via landa revuo, oni havas pretan artikolon, kiujn oni ĝoje sendus al via redaktoro por eldono.

Se vi ŝatus sendi artikolon pri landa scienca novaĵo, bonvolu ĝin sendi rekte al mi por apero en nia blogo (<https://aktuale.sciencia-revuo.info/>)

Se vi ŝatus skribi pli ampleksan artikolon, bonvolu vin registri en la retpaĝo de SR: <https://sciencia-revuo.info/>

Via artikolo tiam aperos en SR, papere.

Se pro io ajn kialo, vi ne povas ricevi la paĝon de nia asocio en via lando, ni povas sendi al vi la pdf-versio de nia revuo por disdono al viaj membroj.

Eblas ke estontece vi ricevos informojn pri SR. Se vi ŝatus ilin ne ricevi, bonvolu sendi al mi etan mesaĝon por ke mi forviŝas vian retadreson el la listo de ricevantoj.

Anthony LUCAS
Por ISAE

Kio okazos al la libroj?

En Esperanto-Centro en Stockholm estas libroj el la biblioteko de SEF, ĉefe duoblaĵoj, sed la biblioteko estas en alia parto de Svedio. En aliaj bretoj en Esperanto-Centro estas libroj kiujn SEF vendas al membroj kaj aliaj.

La estraro de SEF decidis forlasi la lokalojn de Esperanto-Centro en Vikingagatan en Stockholm, kiam la kontrakto pri luo finas, somere en 2017. Kio tiam okazos al la libroj?

Fine de 2013, laborgrupo komencis trarigardi la librojn en la bretoj en Esperanto-Centro. Ni trovis, ke ni havas kvar grupojn da libroj.

Bibliotekaj duoblaĵoj estas proksimume 1.000 libroj, kaj tie estas originala esperanto-literaturo, tradukita literaturo, iom da faka literaturo, kaj ankaŭ iom da literaturo pri esperanto. Multaj el tiuj libroj estas elĉerpitaj el la eldonejoj jam antaŭ longe, kaj multaj el ili aspektas uzitaj aŭ malnovaj. La libroj havas interesan enhavon, kaj meritas "vivi" hejme ĉe membroj. Ni proponis al la estraro de SEF, ke ni vendu ilin al membroj je tre malalta prezo.

En la bretoj por vendataj libroj restas ĉirkaŭ 500 libroj. Ni aĉetis ekzemplerojn por vendo dum la lasta(j) jardeko(j), kaj ofte la **lasta ekzemplero ne vendiĝis**. Tiuj libroj havas freŝan aspekton. Ili ne estas vere unikaj, ĉar multaj el ili estas daŭre aĉetebaj en libroservoj, ĉe UEA kaj en kongresoj. Ni proponis al la estraro de SEF, ke ni vendu tiujn ĉi librojn al membroj je malalta prezo.

En la bretoj proksime de la fenestro troviĝas **aktualaj** lernolibroj kaj vortaroj, libroj eldonitaj dum la lastaj kelkaj jaroj, kaj libroj en aŭ pri esperanto eldonitaj en Svedio. Ilin ni vendas laŭ ordinaraj plenaj prezoj.

La kvara grupo de libroj havas **historian intereson** por la sveda esperantomovado, kaj ni decidis proponi al la estraro de SEF, ke ĝi trovu manieron daŭre posedi tiun librojn. Pri deko da libroj ni kontaktos la muzeon de Vieno.

Vendado: lasta ebleco 24 septembro

La laborgrupo sukcesis anonci pri la libroj per la paĝaro esperantosverige.se kaj per la membrofolio de la klubo en Stockholm "Ekspresso", kaj aranĝis kvin semajnfajnajn tagojn por la vendado dum la printempo 2016.

Kroma vendo-tago estos aranĝita en frua aŭtuno, **sabaton la 24 de septembro 2016**, je 12-15 h. Necesas persona vizito en Esperanto-Centro por aĉeti la forvendatajn librojn. La vendadon organizas Ulla Luin (08-7128291), kune kun Neeltje Boersma-Traunmüller. Pro praktikaj kaŭzoj ne eblos aranĝi poŝtan liveron.

La vendoprezoj por membroj, pri bibliotekaj duoblaĵoj, estas 20 kr por komencitaj 500 paĝoj (pluraj libroj kune, maksimume 3 dm da libroj por ĉiu membro).

Pri forvendataj libroj en la vendobretaro, por membroj, la prezo estas 20 kr por komencitaj 200 paĝoj (pluraj libroj kune, maksimume 3 dm da libroj por ĉiu membro).

Kaj kio okazos poste?

Dum la aŭtuno 2016 ni atentos pri la libroj kiujn ni metis flanken (por muzeo de Vieno, aŭ por SEF), kaj ni parolos kun Eldona Societo pri la libroj eldonitaj en Svedio. Se ni trovos eblecon kion fari al la restantaj nevenditaj libroj, ni kontaktos la estraron de SEF.

La libroj volas esti legataj!

Pri la ceteraj restantaj libroj, se ne aperos pli bona solvo, ja eble restas nur la sorto kiu nomiĝas "bruligebla" en rubaĵejo. Eĉ se ni pakas la librojn por iu stokejo, kaj trovas monon por pagi la luon de ĝi, neniu ja legos ilin.

Tial ni pensas, ke se svedaj membroj pretas aĉeti parton el la libroj je tre modesta prezo, ni eble iom plilongigos la vivon de tiuj libroj. La vero estas, ke tre multaj el la libroj meritas esti legataj, eĉ se nur parte!

Ulla Luin

Du medlem!

Köp esperanto-böcker billigt Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, Stockholm, (T-bana S:t Eriksplan, pendeltåg Karlberg)

**Lördagen 24
september 2016
kl 12-15**

Rea-böckerna säljs bara vid personligt besök.

Kontakt: Ulla Luin, 08-7128291.

(Tidigare tillfällen har annonserats på www.esperantosverige.se och i medlemsblad för Stockholm "Ekspresso".)



Neeltje Boersma-Traunmüller



1 La centa UK en Lilo. Ĝi donas iom da ideo pri kio povas okazi dum jubilea kongreso. Ankaŭ je <https://youtu.be/j5c3H1YN1mA>.

2 Baldaŭ aperos filmo pri Roland Lindblom kaj la civila ceremonio. Ĝi aperos unue en mia Facebook [fejzbuk]. En estonta numero ni anoncos la adreson al youtu.be

Wim Posthuma

**Två filmer
med musik och
texter på Esperanto**